



CIKADO KAJ FORMIKO

Libro I,1

Post somero kaj kantad',
La cikad',
Hejme plu nenion trovis,
Kiam norda vento blovis:
Ne trovigis ec pecet'
De muŝet' aŭ de vermet',
Pro malsato', ĝi petis truda
Helpon de formik' apuda,
Prunton nur de ia grajn'
Por plu vivi kiel ajn
Ĝis sezono nova venos.
Diris: « Tion vi reprenos
Antaŭ varmo, besta fid',
Kapitalon kun profit'. »
Estas ne formik' donema:
Jen manketo inter svarm'.
« Kion faris vi dum varm' ? »
Diris ĝi al best' pruntema.
« Nokte, tage, kantis mi.
Ĉu ne estas tio prava ? »
« Kantis vi, jen mi tre rava!
Nu, dum vintro dancu vi. »



Jean de La Fontaine

8 juil 1621 / 13 avr 1695



Carver-Rogniat